

# MAGAZINO

★ Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj ★  
 Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete - Membro de LEA-Komitato de S.A.T., Paris

## Ĉu ankaŭ vi ricevis difektan MAGAZINO-n n-ro 17?

Malfacilaĵoj kaŭzis malsuperan kvaliton de la eldono. Ĵus antaŭ la festotagoj trafis la ĉefredaktanton inflamo de la maldekstra kruro. Parttempe li devis kuŝi en la lito kaj fridigi la trafitan parton. La kuracisto aflikte taksis la difekton kaj preskribis t.n. antibiotikon kaj tablojdojn.

'Indiano ne konas doloron' kaj ĉefredaktanto volis nepre ekspedi *MAGAZINO*-n n-ro 17 antaŭ silvestro. Dank' al zorga subteno de l' ĉefredaktanta edzino Margot li lamis al la presejo (vendejo de paperaĵoj), kie... fulmotondro... ĝuste dum la lasta tago de l' jaro 1996 terure multaj klientoj opinias devi prizorgi aferojn kiujn ili forgesis prilabori dum la jaro.

Se oni faras mem la presadan laboron, je paĝo oni pagas nur 8 pfenigojn. Pro la tumulto en la vendejo ne eblis akurate pretigi la 1440 kopiojn. Krom tio, dum tiu tago la multobligilo 'lame' funkciis. Reklamacio ĉe la vendisto ne sukcesis, ĉar li estis plene engaĝita kontentigi la dezirojn de la klientaro. Sinjorino, kiu atendis, ke la ĉefredaktanto finu sian laboron, nervoziĝis. Ĉar scivoleme ŝi demandis, kia burleska lingvo jen estus. Stefano komencis klarigi kaj demandis ŝin, ĉu ŝi eble parolas francan lingvon.

"Jes, kompreneble mi estas francino."

Stefano: "Vi certe povas legi ekzemple ĉi tiun tekston."

Subite ŝi devis fini siajn klopodojn kompreni Esperanton, ĉar nigrahara viro venis, ŝajne ŝia edzo, kiu malagrabla rigardas. Li ekscite parolas franclingve kun la sinjorino.

Nu, jes, post tri horoj la ĉefredaktanto finis multobligadon kaj rapidis hejmen, kie li konstatis, ke la produkto parte estis malbona. En januaro li multobligis pli bonajn paĝojn.

Do, ĉiu legantino aŭ ĉiu leganto kiu ne estas kontenta kun sia *MAGAZINO*-17-ekzemplero sendu protestleteron al la *MAGAZINO*-redakcio en Oberkirch kaj kalkulu kun donaco de E-libro.

*MAGAZINO*-redakcio (en marto 1997)

## Elekto de la LEA/G-Estraro

Laŭ la statuto ĉiun duan jaron okazu ĝenerala kunveno. Alprenado de decido povas okazi ankaŭ per referendumo, kiam aranĝo de l' jarkunveno ne estas ebla.

Post la kunveno en Mittelwihl estas 1997 la jaro por elekti novan estraron kaj decidi pri gravaj ŝanĝoj koncerne la asocion.

Ĉar jam ne estas certe, ĉu eblas aranĝi la kunvenon kadre de la SAT-kongreso en Aŭgsburgo mi preferas referendumon per kiu oni atingas ĉiun membron de nia asocio.

Do, karaj geamikoj, mi atentigas pro la aldonita referendumo slipo. La ĝisnunaj estraranoj estas pretaj daŭrigi la aktivecojn kaj mi trovis tre kapablan esperantiston por la *MAGAZINO*-REDAKCIO: Kamarado Gary Mickle el Berlino jam komencis kunlabori kaj subteni la ĉefredaktanton.

Amikan dankon al ĉiu.

Albert Stephan  
1a prezidanto

1997-03-12

[Für Esperanto-komencantoj: Der Text oben betrifft die Wahl eines neuen LEA/G-Vorstandes und Entscheidung über wesentliche Änderungen unseres Bundes. Jedes aktive Mitglied erhält beigefügt einen Wahlzettel.]



Emblem des Deutschen  
Arbeiter-Esperanto-Bundes

## Enhavo:

	paĝo
Kio estas SAT?	2
Nazi-kulturo 1933 (B. Siegert)	3
Socipolitiko	4
Esperanto persatelite (G. Mickle)	4
Esperantista agado en anarkiista medio (W. Firth)	5
LEA-Ligilo	5
SAT-dokumento el 1945	5
Aktivuloj en Belgio	6
Nekrologo Detlev Suck	6
Mondo de komputilo	6
Kie estas la plej profunda loko de l'tero (W. Poppeck)	7
Aŭ ĉu vi volas aŭdi la realecon?	7
Ni vivas por krei ponton	8
La plej bonajn spertojn anoncoj, krucvortenigno-solvo	9
Sunhejmo esperantista	9
Lingva angulo – Sprachecke	10
Ĉu Esperanto estas politika afero?	11
Nacia Esperanto-muzeo Gray – 20a jariĝo	11
La berlina Maldekstra Forumo	12
Renkontiĝo en la berlina metroo	13
Spirita milito	14



## 70-a Kongreso de S.A.T.

02. -09.08.1997  
en Augsburg

### INFORMACIOJ:

Aligilo, programo, hoteloj k.a.

Prezidanto: Hermann Schmidt  
Adreso: Esperanto-Press Augsburg  
Hermann Schmidt, Waterloostr.21  
D-86165 Augsburg  
Tel. (39.0)821 / 792835 k. 488149  
Postbank München (BLZ 70010080)  
Konto: Hermann Schmidt  
Nr. 56 99 93 - 808



### Kio estas SAT?

La literoj SAT mallongigas la nomon de la 'per'-esperanta movado

Sennacieca  
Asocio  
Tutmonda

'Sennacieca' signifas, ke la asocio ne konas limojn. Ĝi naskiĝis en la jaro 1921, estas unuigo de depende laborantoj kaj kontaktiĝas kun aliaj tutmonde por amikiĝi kaj interparoli pri vivo- kaj laborkondiĉoj. Ili uzas la internacian lingvon Esperanto, ĉar ĝi estas facile lernebla lingvo kaj ne necesas studi fremdajn lingvojn.

SAT ne estas partipolitika, sed kleriga, kultura organizo. Ĝi kunlaboras kun movadoj kiuj aktivigas por samaj celoj. Interalie SAT-membroj subtenas aktivecojn de pacifistaj movadoj kiel ekz. TUTMONDE en Terrassa/Hispanio kaj Greenpeace (Verda Paco).

SAT-sidejo estas en Parizo (Francio); en la landoj reprezentas la asocion landaj perantoj honorofice. Peranto en Germanio estas:

Jiri Proskovec  
Heimbastr. 10  
D-44143 Dortmund  
Tel.: (0)231 - 55 12 11

SAT eldonas literaturajn kaj aliajn verkojn, i.a. la *Plenan Ilustritan Vortaron (PIV)*. Ĝi aperigas monatan bultenon *SENNACIULO*, kiu enhavas artikolojn el la mondo de l' laboro, pri politiko kaj okazaĵoj mondvasse. Ilin verkas membroj mem en libera opini-esprimo.

SAT liveras ĉiun duan jaron Adresaron, havas Junulfakon kaj memstarajn frakciojn, ekz. TANEF (Naturamikoj Esperantistoj), Sennaciistoj, Ekologisma Frakcio k.a.

SAT observas demokratajn regulojn, estas kontraŭ rasismo kaj diktaturoj, respektas ĉiun pensmanieron, kiu ne estas kontraŭ homaj bezonoj kaj vivmanieroj (humanismo).

Pri aliĝo al SAT bv. skribi al la peranto aŭ al la reprezentanto A. F. Stephan, Renchener Str. 47, D-77704 Oberkirch (Baden).

AFS

**SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo! Lanti**

## Nazi-kulturo 1933 (dua parto)

### Kaŭĉuka bastono sur la dorso...

Rakontas Bruno Siegert: "Post 20 minutoj mi denove estis pridemandata. Tio okazis laŭ jena maniero: Ĉe ĉiu demando mi ricevis puŝon aŭ baton. Estis eldiritaj akuzoj, kiuj estis libere elpensitaj, por porvoki kaj por havi kaŭzon por draŝi. Ekz. oni diris al mi: 'Vi, ruĝa porko, kontraŭbatalis dum 20 jaroj nin kaj Grand-Germanion. Per via Esperanto-afero vi faris ŝtatperfidon, spionadon kaj demagogion. Vi skribis leterojn al internaciaj unuiĝoj, vi vojaĝis eksterlanden kaj vi ĉie laboris kontraŭ ni.'

Pri tio oni sciu, ke Hitler persone estis kontraŭulo de ĉia internacia pensado. Li ne sciis fremdlingvon kaj jam skribis kontraŭ mondhelplingvo en sia libro 'Mia Batalo' (*Mein Kampf*). Li ankaŭ malpermesis Esperanton kaj rigardis la aŭtoron, judan okulkuraciston, kontraŭulo. La grandul-frenezeco de Hitler do ankaŭ kontraŭis internacian interkompreniĝon. La saman sintenon li havis pri aliaj aferoj, nome: ĉion pereigi, kio ne estis nazi-konvena. La vero pri la 'Tria Regno' ne atingis eksterlanden per Esperanto.

Kiam mi volis korekti tiajn mensogojn kaj falsajn akuzojn kaj ne povis transdoni sekretajn listojn, SS-viro batis min per kaŭĉuka bastono sur la dorson, sur la manojn kaj en la vizaĝon. Mi do kriis al li:

"Vi ja scias, ke mi estas militvundita, vi mal-kuraĝaj hundoj."

Sekve mi ricevis denove baton en la vizaĝon, ke mi nenion plu povis vidi. Kiam mi kriis 'Vi friponoj ja blindigis min' oni ekhaltis kaj kondukis min al la komandanto (kiel mi aŭdis li estis *Standartenführer*<sup>5</sup> de Schweidnitz. Oni verŝis bieron en

mian vizaĝon kaj kiam oni kriegis 'elkonduku la porkon' alia jam draŝita kamarado prenis mian manon.

Kiam ni ambaŭ iradis hejmen do al la urbo, sekvis nin tri Naziuloj bicikle. Ili postulis de ni, ke ni kantu la nacian himnon. Ni ne faris, sed ili lasis nin trankvilaj.

Miaj nervoj estis plene elĉerpitaj kaj kiam mi hejme alvenis, kie mia edzino kaj la infanoj jam maltrankvile atendis min, ekkaptis min tremfebro kaj konvulsia plorado.

Postan tagon denove venis tri SS-viroj en la loĝejon por kunpreni min ankoraŭfoje al mallonga pridemandado, ili diris. Sed eraro kiel oni poste klarigis al mi, ĉar inter la multaj nomoj sur la listo la mia estis dufoje notita.

Pro la priskribitaj okazaĵoj mi estis grave malsana kaj neblis labori labori dum kelkaj jaroj; la vidpovo de mia maldekstra okulo grave malpliigis.

Kelkajn semajnojn post tiu teror-nokto mi perpoŝte ricevis skribaĵon per kiu oni invitis min aliĝi al la novfondita 'Nacisocialista Esperanto-Asocio', kiu per Esperanto varbu por la ideoj de Hitler (eksterlanda propagando). Mi respondis tiun skribaĵon kaj postmallonga tempo eksciis, ke la novfondaĵo bankrotis.

Tio estas ĉapitro de la 'Nazi-kulturo', kiu iam intencis konkeri la mondon.

<sup>5</sup> altranga SS-funkciulo kiel kolonelo

el mia taglibro – Fürth/Bavario, septembro 1945  
Bruno Siegert (trad. F. W. Poppeck, Oberkirch)



## Socipolitiko

Kiam mi venis el mia provinco Parizon kaj provis tie per mia metio akiri vivrimedojn, mi dungigis ĉe mastro, kiu okupis nur du metilernantojn. Li tuj ekvidis, ke mi estas malsperta provincano, kiu tute ne konas la kutimojn kaj laborarifojn de granda urbo. Li bonuzis la okazon por pagi al mi malaltan salajron kaj eĉ trudi, ke mi laboru, kiel en mia provinco, 12 horojn ĉiutage kaj plie 6 horojn dimanĉe matene. Tiam mi ne sciis pri ekzisto de sindikatoj, mi eĉ emis kredi, ke la mastro favoras min, bonvolante doni al mi laboron. Kaj tiel dum kelkaj monatoj pasis mia vivo. Iun tagon, ĉe gastejo, mi renkontis aliajn sammetianojn, kiuj demandis min pri mia salajro ktp. Aŭdinte mian respondon, ili insultis min, malbenis kaj minacis bati en la vizaĝon, tial ke mi laboras por salajro pli malalta ol tiu difinita de la sindikato.

– Jen tiaj fiprovincanoj venas Parizon kaj per sia stulto kaj neorganiziteco ĝenas nian batalon kontraŭ la mastroj. For! for, malbenindaj kamparanacoj!

Kvankam tia akcepto ŝajnis al mi iom kruda, mi penis klarigi, ke mi volonte sindikatiĝos kaj postulos al la mastro la sindikatan tarifon. Tiel okazis kaj finfine mi akiris la parizan civitanecon, se mi tiel povas diri.

Nu, ĉu estus preferinde, ke mi reiru en mian provincon kaj tie agitu por ĝia sendependiĝo?

Ĝenerale la koloniaj laboristoj estas ja pli ekspluatataj ol la laboristoj el la metropolo. Tamen ne per batalo por nacia liberigo ili plibonigos sian sorton, sed per unuiĝo kun la sammetianoj en la tuta mondo por liberigi sin el sub la kapitalista ekspluatado. Unuvorte, por proleto la klasbatalo estas la sole racia kaj profitdona. Kaj se la laboristoj el la metropolo bone komprenos siajn proprajn interesojn, ili klopodos helpi siajn kamaradojn, instigante ilin organiziĝi kaj klaskonsciigi.

La ekspluatantoj tute ne atentis la naciecon de la ekspluatatoj, sed celas nur trovi laborforton por kiel eble malplej alta prezo. Kaj se ie proletoj ne estas postulemaj, sufiĉe bone organizitaj, tia stato reefikas malhelpe alien, kie laboristoj energie klasbatalas.

E. Lanti (14-IV-1929)

★  
**ESPERANTO**  
SENNACIECA LINGVO

## Esperanto persatelite ankaŭ ĉe vi hejme

Freŝaj aktualaĵoj kaj furorantaj muzikaĵoj de Esperantujo radias de satelitoj sur vian urbon kaj atendas, ke vi kaptu ilin (kun bonega sonkvalito). Ne pensu, ke temas pri afero nur por teknikmanuloj. La Esperantaj radioelsendoj, precipe de Radio Polonia, estas profesinivelaj kaj lingve modelaj. Min ĉiam denove frapas la lingva lerteco, per kiu la varsovia redakcio esperantigas – ofte sub tempa premo, kiel oni povas supozi – la bezonatajn terminojn el la politika kaj socia vivo. La elsendoj de Radio Polonia finiĝas per kelkminuta prezento de Esperantaj muzikaĵoj, per kiuj mi eksciis ion pri la larĝo de la muzika kulturo de Esperanto, kaj ke ĝi estas pli bona ol mi antaŭe kredis.

Antaŭ pli ol duona jaro ni ricevis donace satelitan antenton kaj ricevilon. La antenon mi fiksas al stango kaj firme enbetonigis ĝin en plasta sitelo, kiu nun staras sur la balkono kaj laŭbezzone turneblas. Ni ne spertis problemojn ĉe la instalo. Necesas tamen mencii, ke ĉio estis realigebla nur dank' al tio, ke niaj fenestroj kaj balkono frontas la sudon. Ni nun kun granda intereso aŭskultas preskaŭ ĉiuvespere la elsendon de Radio Polonia je la 20a horo MET.

Iĝis laŭ mia sperto malfacile kapti la kurtondajn kaj la mezondajn elsendojn dum la pasintaj jaroj. Eĉ kiam eblis, la sonkvalito variis kaj interfero pli ol iomete agacis. Nun fariĝis vera plezuro aŭskulti la selekton de Esperantaj muzikaĵoj fine de la elsendoj.

Ankaŭ la semajnaj elsendoj de Radioj Vatikana kaj Roma facile kapteblas. Por kapti la elsendojn el Vieno necesas turni la antenon (kion mi ankoraŭ ne provis).

Kelkaj teknikaj detaloj:

- Ekipaĵo de satelita ricevilo kaj anteno aĉeteblas je prezo ekde 160 DM, kiel mi laste vidis.
- Bedaŭrinde necesas povi direkti la antenon al pozicio preskaŭ rekte sude kaj iomete super la horizonto. Fiksi ĝin al la muro ne nepras, se eblas fari provizoraĵon kiel ni sur la balkono. Turni la antenon al la celata satelito kostas kelkajn minutojn, sed ne estas enorme malfacila.
- Per Eutelsat (13° oriente) venas **Radio Polonia** ĉiutage je la 6.30, 15.30 kaj 20.00 MET (11,476 GHz Hpol [TV Polonia] 7,38 MHz), **Radio Vatikana** dimanĉe je la 21.20 MET (10,987 GHz Vpol [NBC] 7,38 MHz) kaj **Radio Roma** sabate inter la 21.00 kaj 21.20 MET resp. inter la 22.00 kaj 22.20 MEST (11,446 MHz Vpol [RAI] 7,56 MHz).
- Per Astra (19,2° oriente) venas **Radio Aŭstria Internacia** (11,141 GHz Hpol [BFS3] 8,10 Mhz).

G. M..

## NOVAĴOJ

**Esperantista agado en anarkiista medio**

En la anarkiista movado en Germanio disvolviĝas modesta agado por kaj per Esperanto. Supozeble legantoj havas intereson ekscii pri la aktivecoj en tiu 'faka' medio.

En la anarki-sindikata organiza 'Freie ArbeiterInnen-Union (FAU)' estas tri parolfluaĵoj esperantistoj inter ĉ. 160 membroj. Komence de 1994 la ĉiudumonata FAU-gazeto *Direkte Aktion* (aktuala eldonkvanto 5000 ekzempleroj) ekaperigis duonpaĝan kurson por komencantoj surbaze de *Esperanto Schritt für Schritt*. Fine de 1995 la kurso anstataŭis kolumno en Esperanto kun originalaj informoj el la anarkiista movado tutmonda. (Similan kolumnon resp. paĝon jam publikigas anarkiistaj periodaĵoj en Hispanio kaj Japanio.)

En somero de 1996 FAU okazigis kvintagan E-kurson por komencantoj, kiun gvidis la ĉi-landa SAT-peranto, Jiri Proskovec. Dank' al tia paŝopostpaŝa propagando la sinteno de la FAU-anaro ŝanĝiĝis de la kutima skeptikeco al supraĵe pozitiva rilato. Dum la pasintaj du jaroj proksimume trideko da FAU-membroj ek-esperantistiĝis, tial stariĝas la tasko konservi kaj kreskigi tiun komencan intereson. En 1995 la kongreso de FAU akceptis rezolucion kulturi Esperanton kaj apliki ĝin ĉiam pli ofte por la internaciaj rilatoj. Same decidis en decembro de 1996 la kongreso de la 'Internacia Laborista Asocio - ILA' (anarki-sindikata internacio), sed multe da laboro estas fareda por ke Esperanto anstataŭu la oficialan dulingvan (hispanan-anglan) kaoson en la praktiko. Fine de 1996 la Fakgrupo pri orienta Eŭropo de FAU aperigis 16-paĝan raporton en Esperanto pri sia laboro.

En la pasintaj jaroj povesperantaj kontribuadoj aperis en diversaj anarkiistaj publikaĵoj, ekz.

en la 'Schwarzroter Kalender' por la jaro 1995 (*Esperanto - Libertärer Sprengsatz unter dem Turmbau zu Babel*). Ampleksa kontribuado pri Esperanto estas verkata por *Lexikon der Anarchie*.

Sur internacia nivelo anarkiistaj esperantistoj kunordigas siajn aktivecojn interalie en la Liberecana Frakcio de Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT. Tiu eldonas kvaronjaran bultenon *Liberecana Ligilo* (kiu cetere en la jaroj 1990-1992 estis redaktata en Berlino, nun en Brazilo). La revuo *Laŭte* (Francio) disponigas siajn paĝojn al liberpensuloj kaj diverstendencaj socialistoj (inkl. anarkiistoj). Simile malferma estas la aliro de la relative juna berlina grupo 'Maldekstra Forumo'. Ekzemplerojn respektive fotokopiojn de la menciitaj publikaĵoj vi povas ricevi de Will Firth, Lychener Str. 73, D-10437 Berlin. (Telefona/telekopiilo: 444 83 98)

Will Firth

**LEA-Ligilo**

Alan Gould kaj Ron Lynn de SATEB (SAT en Britio) eldonas ligilon por informi LEA-ojn pri la okazaĵoj el landaj al SAT ligitaj asocioj.

MAGAZINO ricevis la unuan eldonon, februaro 1997. Ĝi estas presita sur agrabla flava papero DIN A4. Aspekto kaj enhavo estas elstaraj, bone legebla, en tri kolumnoj.

Jam hodiaŭ ni povas konstati, ke ĝuste tia ligilo estas necesa por la kontaktoj inter frate ligitaj laboristaj Esperanto-movadoj, kiuj ekzistas ĉie en la mondo.

Ni ĝojos pri venontaj eldonoj kaj deziras al la redakcia skipo plenan sukceson. LEA/G certigas liveri materialon, kiam estos io.

Cetere: 'laborista' signifas 'dependaj laborprenantoj' ĉu laboristoj ĉu oficistoj.

AFS

**SAT-dokumento el 1945**

Post la dua kruela mondmilito alvokis SAT per manifesto la membrojn doni vivsignon al la asocio.

Kamarado Gilbert Lebec sendis ekzempleron al la estraro de nia asocio kaj petis zorgi, ke la dokumento trovi lokon en la arkivo de la Fritz-Hüser-Instituto de la urbo Dortmund.

La instituto akceptis, kaj la direktoro, profesoro d-ro Rainer Noltenius, sendis leteron (sub dato 07.02.97) - en Esperanto - al Gilbert Lebec. Jen la teksto:

'Kara kamarado Lebec, akceptu ankaŭ de mi persone koran dankon por la afabla alsendo de la Manifesto de SAT de julio 1945, kiun mi de vi ricevis pere de Albert Stephan. - Mi ĝojus, kiam la kontakto inter la SAT-sidejo en Parizo kaj la Fritz-Hüser-Instituto okazos estontece ankaŭ rekte kaj estus salutinda, se ni povus montri la ekspozicion pri la historio de la laborista esperanto-movado kaj de SAT ankaŭ foje dum SAT-kongresoj respektive en Parizo. Mi aŭdis, ke en Parizo en la centro de Pompidou oni aranĝas ĉiujare esperantajn okazaĵojn. Ĉu tio ne estus konvena motivo por montri la ekspozicion eventuale eĉ tie? - Nia engaĝita kunlaboranto Jiri Proskovec jam demandis ĉu estus por via arkivo/biblioteko interesa kompletigi viajn posedaĵojn, kion ni volonte ebligos per interŝanĝo de niaj duoblaĵoj.

kun kamaradecaj salutoj  
(subskribis: prof. d-ro  
Rainer Noltenius)

PS Ni aldonas pri la ekspozicio tri ekzemplerojn de la afiŝo kaj la kontrakton pri la elprunto kaj la serion de bildkartoj, kiuj same kiel la ekspozicia katalogo apartenas al la akompanata ekspozicia materialo.

### Aktivuloj en Belgio

Stella de Weerd kaj Jacques Schram sendis detalan leteron (dato 15.02.97) pri *LEA-Ligilo* kaj okazaĵoj en Nederlando, kie la laborista FLE (nederlanda LEA) 'malaperis'.

FLE estas jam delonge temo en SAT- kaj LEA-rondoj. Laboristaj kaj oficistaj esperantistoj, kiuj aktivis por laborista esperantismo, ne povas saluti aliĝon al neŭtralaj Esperanto-organizoj. En certa senco ankaŭ LEA-oj estas neŭtralaj, sed ili aktivis inter sindikatistoj kaj anoj de socialistaj partioj. Tion neŭtralaj – permesu, ke mi specifigu: konservativaj – Esperanto-organizoj ne povas detale prilabori, ĉar ili devas ĉiam konsideri dezirojn kaj diversajn opiniojn de siaj membroj, kiuj venas el ĉiu socia klaso.

LEA/G tute ne intencas aliĝi al la Germana Esperanto-Asocio kiel eventuala fako, kvankam antaŭ jaroj oficuloj de GEA jam demandis pri tio. Kion oni povas akcenti? Ni alten tenas la flagon de la laborisma esperantismo, kiu jam ekzistas ek de la jaro 1911. Kaj: Ni estas ligitaj al SAT.

Albert Stephan



### Nekrologo

Ni ricevis sciigon, ke bedaŭrinde nia fidela membro

### Detlev SUCK

mortis la unuan de januaro 1997 en Düsseldorf. Li aliĝis al LEA/G en marto 1994. Ni perdas fidindan kamaradon, kiu bone majstris la Internacian Lingvon Esperanto. Ni kondolencas al la familianoj.

LEA/G-Estraro

### Mondo de Komputilo

Ni ricevis leterojn, dato: 97-01-16 de ELF – Esperanto-Ligo Filatelista (Rolf Beau, Althen) kaj de Helmut Breuninger, Ulm, dato: 97-02-01, pri komputilaj terminoj. Helmut informis pri tradukoj de eminentaj esperantistoj kaj el *Plena Ilustrita Vortaro (PIV)*. Jen listo de l' terminoj:

<u>angla esprimo</u>	<u>Beau</u>	<u>Breuninger</u>	<u>PIV</u>
bit	bito	bito	bito
byte	bitoko	bajto, okbita	bajto
chip	ĉipo/blato	ĉipo	ĉipo
computer	komputilo	komputro	komputero
GB	gigabajto	gigabito	gigabito
hardware	hardvaro	harto	hardvaro
Hauptspeicher	centra memorilo	ĉefmemorujo	primara memoro
KB	kilobajto	kilobito	kilobito
MB	megabajto	megabito	megabito
Prozessor	procesoro	procesoro	procesoro
RAM	ramo	ramo	ramo
software	softvaro/ programaro	softo/softvo	softvaro
Festplatte		durdisko	malmola disko
CD-ROM		co-do-romo (drajvo)	
integrierter Schaltkreis		ico	
gigabyte		gigabajto	gigabajto
Konfiguration		kombinaĵo	
Zwischenablage		nedaŭra deponilo	

Inter la esprimoj de Breuninger estas tiaj de Münnich, Budapest kaj Eichholz, Pekoteko.

Krome *MAGAZINO* ricevis eĉ vortaron pri komputilaj terminoj de Gary Mickle, Berlin.

[*Noto de G.M.*: Vortaro estas tro laŭda priskribo. Temas pri iom ampleksa listo de terminoj, kiun mi faris por propra uzo. Rekomendinda ŝajnas esti – kvankam mi ankoraŭ ne aĉetis ĝin – la *Komputika leksikono* de Sergio Pokrovskij, aperinta ĉe Sezonoj en 1995.]

**SAT SUR TTT : <http://www.worldnet.net/~sat-esp/>**

## Kie estas la plej profunda loko de l'tero?

La bordo de la Maro Morta estas la plej profunda alirebla punkto de l'tero. Ĝi troviĝas 406 metrojn sub Normal-Nulo (NN).

Sed: La plej profunda loko sur la tero troviĝas en la Mariana Fosaĵo, kiu estas profunda 11034 metrojn sub la marnivelo. La plej profunda loko sur la kontinento estas la nealirebla Bertley-Fosaĵo en la antarkto. Ĝi profundas 2538 metrojn sub la marnivelo.

Dum multaj jaroj la akvonivelo de la Maro Morta (nuntempe 406 metrojn sub NN) malaltiĝis je 3,5 centimetroj jare, ĉar la israelianoj el la Jordan-rivero, kiu estas la unusola alfluo, elprenis daŭre akvon por la orangoplantejoj. Ĉar intertempe oni pli ŝparas akvon, la nivelo denove kontinue kreskas.

La Maro Morta apartenas al la Siria Fosaĵo, aĝa ĉirkaŭ kvin milionojn da jaroj, kiu etendiĝas de la lago Geneza-reth en la nordo ĝis la Viktoria-lago en sudo de Afriko. Estiĝis la fosaĵo tie, kie du kontinent-tavoloj disdrivas. Tertremoj kaj vulkanismo de tiam kelkfoje aliigis la formon de la Maro Morta.

Tiu maro havas longecon de 60 km kaj larĝecon ĝis 17 km. Hebrealingve ĝi trafe nomiĝas Barh Lut (salolago), ĉar ĝi estas la plej salhava maro sur la tero. La akvo entenas ĝis 30% da salo, pli ol dekoblan kvanton de salenhavo de la oceanoj. La ekstreme malalta situo de la maro signifas interalie, ke la aerpremo estas superaverage alta. Pro tio la akvo de la Maro Morta nur bolas ĉe 101° C.

La israelianoj evoluigis plurajn planojn por konstruo de kanalo, kiu interligu Mediteraneon kun la Maro Morta. Unue oni volas utiligi la altec-diferencon por elektro-centralo kaj krome oni povus realtigi la akvonivelon. Sed verŝajne antaŭe oni realigos projekton pri kanalo inter Ruĝa Maro kaj Maro Morta.

(el *Die Mischbütte* tradukis F. W. Poppeck)

## LA TERO



## Aŭ ĉu vi nur volas aŭdi la realecon?

Estis agrable trankvila somera nokto. La stelplena firmamento disradiis kvieton, kiun la ĉirpado de griloj ne ĝenis. Tra la herbejo serpentumis rivereto. De tie oni aŭdis virajn voĉojn. Post kelkaj minutoj eklumis fajro. En la malforta lumo de flamoj oni vidis tri virojn, kiuj eksidis ĉirkaŭ la fajro. Laŭ ilia prononco, ili venis el malproksima lando.

"Kalle, rakontu al ni iom," petis Hein.

Kalle enspiris profunde kaj komencis: "Tiam – tiel komenciĝas ĉiuj fabeloj – vivis en fora lando belega, juna virino. Kiu ekrigardis ŝin, tuj enamiĝis al ŝi. La hararo de la belega junulino estis longa kaj brilis kiel oro."

Ekĝemis Jan: "Mi ne ŝatas tiajn fantaziaĵojn!"

"Mi petis vin, silentu!" rediris Hein.

Jan grumblis al si iom en la barbon nekompreneble.

Estas fabelo, ĉu vi komprenas?" akcentis Kalle kaj daŭrigis: "Aŭ ĉu vi nur volas aŭdi la realecon? Ĉu mi parolu pri la mizero en nia vilaĝo? Ek de tagoj ni marŝas tra la mondo por serĉi laboron kaj gajni iom da mono."

"Mi opinias, ke ni ne bezonas tiajn infanaĵajn rakontojn", objetis Jan.

"Jes, infanaĵaj, sed belaj! Kaj ni estas homoj, kiuj bezonas tiajn infanaĵojn. Kiam ni aŭskultas fabelojn, kantas kune aŭ ludas teatron, tiam ni forgesas por mallonga tempo la malbenitan realan vivon."

Post mallonga paŭzo Kalle daŭrigis: "La belega junulino estis kiel la fajro. Jam dufoje ŝi edziniĝis. Kaj ĉiam la edzoj mortis dum la unua nokto. Ili mortis en ŝiaj brakoj, sufokitaj pere de ŝia hararo."

Jan ĝemis: "Kia fivirino!"

"Ĉu ne via edzino havas orkoloran hararon?", demandis Hein per moka voĉo al Jan. "Tamen vi ankoraŭ vivas."

"Mia edzino estas alia virino."

"Ĉu vi estas konvinkita? Vi lasis ŝin sola. Ankoraŭ ne forpasis kvar semajnojn, ekde kiam vi geedziĝis. Ĉu vi jam satiĝis aŭ...?" demandis du-signifa Hein.

Per raŭka voĉo respondis Jan: "Tio estas mia propra afero." kaj eksilentis.

Tamen Hein mokis plue: "Ĉu vi ne timas, ke ŝi trovos alian viron? Ŝi estas dezirinda?"

Jan silentis.

Baldaŭ la lastaj flamoj estingiĝis kaj post mallonga tempo kaj Kalle kaj Hein ekdormis.

Nur Jan ne. Lia penso forportis lin hejmen al lia junedzino. Ĉu ŝi...? Ĉu ŝi vere...? Abrupte Jan vekigis el la maldorma sonĝo kaj ekstaris.

Dum la sekvinta mateno, tre frue, la malvarmeta venteto vekis Kalle kaj Hein. Ili vidis, ke Jan ne plu troviĝas inter ili.

rerakontita K.H.K.

## Ni vivas por krei pontojn

Tiel skribis la prezidanto de Esperanto-Asocio de Estonio, Ahto Kaljusaar, meze de 1995 en la organo de EAE. Mi opinias, ke ankaŭ ni pripensu la vortojn, ĉefe la lastan frazon.

"En la lasta Ĝenerala Kunveno de Esperanto-Asocio de Estonio niaj esperantistoj dolore parolis pri la nuna kriza situacio en la movado. Oni povus ankaŭ pravigi: en la kriza situacio estas ankaŭ multaj aliaj, aliaj organizaĵoj, aliaj landoj. Tamen, ni ne ekzistu por pravigi mankojn kaj nefariton. Aŭdinte plendojn mi kelkfoje vere hontas. Dum longaj jaroj niaj gesamideanoj sindone agadis malantaŭ la fera kurteno, multaj dum la tuta vivo ne povis vojaĝi kaj uzi la lingvon por ĝia vera celo – por amika komunikado eksterlande. Hodiaŭ, kiam nia lando estas libera, ni povas diversflanke agadi. En la ĉiutaga vivo la sorto tamen fabele nenion donacas al ni.

Homoj mem devas serĉi eblojn per streĉa laboro, per saĝa agado. Estas laste konata rakonto pri du amikoj, kiuj vojaĝante subite estis antaŭ danĝere abrupta abismo. Unu ekpanikis, malesperis kaj plendadis, dum la alia gaje komencis serĉi eblon por krei ponton trans la abismon.

Al kiu el ili vi similas?"

KHK

## La plej bonajn spertojn

oni ricevas, kiam oni studas la aferon en la ĝusta loko mem. Ankaŭ en tiu kazo! Kiam mi pasintjare vizitis Finnlandon, mi petis iun el miaj amikoj tie montri al mi tipan finnlandan trinkejon.

En la trinkejo ni serĉis bonan sidlokon, kie ni povis havi ĝustan superrigardon. Ni gustumis bieron kaj babilis pri tio kaj jeno. Mia amiko atentigis min pri la 'pordoviro' (laŭvorta traduko el la finna lingvo). Ĝuste pri tia homo li rakontis al mi historieton:

"Kara Henriko, bonvolu aŭskulti kaj certe poste vi estos spertulo pri finnlandaj trinkejoj. Eksterlande ofte staras viro antaŭ la enirejo de l' restoracio, kies tasko estu allogi gastojn eniri, trinki kaj manĝi. Ankaŭ en nia fora kaj multfoje malvarma lando staras pordoviro, antaŭ la enirejo de restoracioj kaj trinkejoj, sed kontraŭe al la taskoj de eksterlandaj kolegoj ili zorgas, ke ebriaj gastoj ne eniru. Oni komprenu, ke en nordaj landoj pro la longdaŭra malhelo dum aŭtuno kaj vintro homoj serĉas fuĝon per alkoholaĵoj.

Ofte vi trovas pordiston, kiu aspektas tre kolosa. Inter ili estas eks-boksistoj kaj luktistoj. Tio sendube estas avantaĝo, ĉar ĉiam eĉ ĝis senkonscio ebriaj finnoj firme asertas, ke ili estas absolute la plej sobraj en la tuta restoracio aŭ trinkejo, eĉ en la tuta kvartalo kaj ne volas esti eligitaj el gaja kaj varma societo. Do, la pordisto devas forigi tian homon perforte.

La sistemo havas ambaŭ kaj avantaĝon kaj malavantaĝon. Sed bedaŭrinde pordoviroj intertempe opinias, ke ili ĉiam pravos, la gasto, kliento, neniam. Ĝus antaŭ unu semajno baris manplatego mian intencon eniri trinkejon. Pordisto diris: "Sinjoro, vi jam tro antaŭtrinkis, pli bone iru hejmen."

Ne helpis mia akra argumento, ke dum la pasinta monato mi trinkis nur freŝan akvon. Ĉu li eble kverelis kun sia edzino aŭ doloris unu el liaj dentoj?

Iun alian tagon mi celkonscie paŝis al tiu trinkejo. Ŝajnis al mi, ke la pordisto suspekteme okulumis min, sed nenion diris. Ĉu denove harmonio kun la edzino? Mi povis eniri.

"Ĉar memservo, mi portis ŝaŭman bieron al iu tablo. Post kelkaj minutoj alproksimiĝis viro, proksimume 40-jaraĝa, ne konata al mi.

"Saluton, ĉu eblas aliĝi al la societo?" Li etendis la manon, "Mia nomo estas... Rido."

"Rido? Malgraŭ la nomo, vi ne aspektas tre bonhumora."

"Nuntempe neniu bonhumoras. Sed kiel vi interpretas mian antaŭnomon koncerne humoron?"

Mi klarigis, kion 'Rido' signifas en Esperanto.

Li daŭrigis: "Ke mi ne aspektas bonhumora kaŭzas mia laboro, kiu ne estas kutima. Ni povas veti, ke vi ne divenos mian profesion. Se vi divenos ĝin mi donacos al vi glason da biero, sed alikaze vi por mi. Ĉu konsentite?"

"Hm, mi ne povas diveni vian profesion."

"Mi estas profesia antaŭridisto. Ekzemple en televido sidas homoj en studio kiuj ne scias kiam ridi. Tiam mi antaŭridas. Ĉu vi komprenas?"

"Jes, sed ne provu konvinki min, ke oni pagas por tio."

"Oni devas, ĉar mi estas profesiulo. Mi povas prezenti kion mi laboras."

"Bone faru tion."

"Mia gorĝo estas seka, biero helpus..."

Mi alportis denove bieron por ni ambaŭ, ĉar la kazo interesis min. La antaŭridisto fintrinkis kaj post paŭzo diris: "Bone, nun la pruvo."

Li varme premis mian manon kaj eksplodis je senbrida ridego batante unu de siaj femuroj per manplato. Mi devis konstati, ke la prezentado estis vere profesia kaj mi sen intenco kunridegis, kvankam mi normale estas serioza homo. Ĝuste kiam la artaĵo atingis kulminan punkton, la pordoviro elĵetis la 'majstron' el la trinkejo. Post kelkaj minutoj ankaŭ min."

rerakontis K. H. Kersting

Cetere: Mia amiko estas la SAT-peranto en Finnlando.

**NE FORGESU SUBTENI  
SAT SUR INTERNET !  
@@@@@@@@@**




**Krucvortenigmo – Kreuzworträtsel  
en MAGAZINO n-ro 17**

Solvo: **horizontala - waagerecht**

1: frakasi; 7: erari; 9: bele; 11: mano; 13: oni;  
15: iom; 17: ami; 18: kamion'; 21: homo; 22: reto;  
24: ornami; 26: don'; 28: ili; 30: eta; 32: algo;  
34: tiom; 36: inter; 37: ago; 38: nia

**vertikala – senkrecht**

2: rel'; 3: areo; 4: armi; 5: sia; 6: obei; 8: motivo;  
10: epoko; 12: nom'; 14: nei; 16: mamon'; 17: anemi;  
19: mor'; 20: ora; 21: hodiaŭ; 23: tilio; 25: noti;  
27: obl'; 29: iama; 30: eono; 31: aten'; 33: gig'; 35: iri




DUMONATA LIBERESPRIMA GAZETO  
eldonata de Amika Esperanto-Rondo  
adreso : ESPERANTO, FR-47470 BEAUVILLE

- \* celas plejeble favori **liberan esprimadon** de ĉiuj siaj abonantoj pri ĉiuj temoj, sen tabuo kaj sen cenzuro.
- \* Krome, **Laŭte!** celas favori ankaŭ **rektajn interrilatojn** inter siaj abonantoj.

**Kie aĉeti Esperanto-librojn?  
Wo erhält man Esperanto-Lehrbücher  
und Wörterbücher?**

- 1: Esperanto-Libroservo Rolf BEAU  
Saxoniastrasse 35, D-04451 Althen
- 2: Libroservo Consuelo FÜHRER, Am Stadtpfad 11,  
D-65760 Eschborn

Bv. demandi pri libro-listo. Kelkajn librojn vendas  
ankaŭ: MAGAZINO ĉe Stephan, Renchener Str.47  
D-77704 Oberkirch (Baden)




*Ristorante  
Esperanto*

Piazza Baracco ☎ (019) 695357  
**FINALE LIGURE (SV)**



**Sunhejmo**

Belega loko 100 m super la svisa urbeto Rheineck apud la landlima rivero Alten Rhein. Belaj vojetoj gvidas vin al kaj en la ĉirkaŭaĵo. Belrigardo al la lago Bodensee kaj montoj en Aŭstrio kaj Germanio. Samideano Hans Kästli invitas la ge-esperantistoj de la vasta mondo starigi siajn tendojn apud la Sunhejmo kaj ĝui agrablan restadon. Ne ekskluzivaj kostoj! Ĉaŭ. 2 svisaj frankoj po persono kaj tago. Lui ĉambreton estas ebla. En ĉiu kazo skribu por ricevi INFOjn al: **SUNHEJMO** Hans Kästli, Sonnenheim, CH-9422 Rheineck (Tel: (071)8881220



**Kiam en Varsovio vizitu spektaklon en  
ESPERANTO-TEATRO  
'ESPERO'  
de Jerzy Fornal**

Sidejo: Art-Galerio 'Nusantara', Varsovio,  
str. Nowogrodzka 18a (tel.29-24-41)

Prezentoj unufoje monate ĉiun unuan lundon, je 17h. Antaŭ spektakloj okazos diskutoj pri kulturaj temoj je la 16-a horo. Gvidos Zofia Banet-Formalowa kaj invititaj gastoj.

Ĉar MAGAZINO aperas en aprilo 1997 la bulteno nur povas informi pri jena repertuaro:

- 7 apr 1997 - Prikanti la homan sopiron (Laczkowski)
- 5 maj 1997 - Rimletoj (baz. je poezio de Marjorie Boulton kaj William Auld)

2 jun 1997 - Wolfgangeri (G.Gällmo)  
BONVENON AL NIA TEATRO, karaĵ amikoj! De via ĉeesto kaj apogo dependas la sukceso de nia komuna Esperanto-Teatro 'Espero' - >>>Spektantoj pagas nur enirbileton por la Art-Galerio<<

## Lingva angula -

## Sprachecke

Im Prinzip benötigt man im Esperanto im Gegensatz zu anderen Sprachen nur eine geringe Anzahl von Wörtern, um korrespondieren und sich unterhalten zu können. Erfahrene Esperanto-Sprechende sind überzeugt, daß schon die Kenntnis von 400, im Höchstfalle 600, Wörtern ausreicht.

Esperanto bildet von Stammwörtern (auch Wurzel- oder Radix-Wörter genannt) durch Vorsilben und Nachsilben weitere Wörter, so dass sich das Auswendiglernen von vielen Begriffen erübrigt. Vom Stammwort ausgehend entsteht durch eben og. Silben eine Wortfamilie. Als Beispiel: Vater = patro Mutter = patrino, Schwiegervater = bopatro usw.usw.

Es ist selbstverständlich, daß Esperanto-Lehrbücher auf einer der Schlußseiten die Wortbildungsilben zusammengestellt haben. Dennoch sollte man sie sich immer wieder vor Augen halten. Die lingva angulo im MAGAZINO möchte dazu dem Leser helfen und führt diese Silben nachstehend auf:

## 1: Vorsilben

- bo- verwandt durch Heirat
- dis- zer-, auseinander (rompi = brechen, disrompi = zerbrechen)
- ek- beginnende Handlung (dormi = schlafen, ekdormi = einschlafen)
- eks- ehemalig wie ex
- fi- mortalische Herabsetzung (homo=Mensch, fihomo=Lump)
- ge- beide Geschlechter (patro = Vater, gepatroj = Eltern)
- mal- Gegenteil (hela = hell, malhela = dunkel)
- mis- falsch, irrig (uzi = brauchen, misuzi = mißbrauchen)
- pra- Ur- (prahomo = Urmensch)
- re- wieder-, zurück- (vidi = sehen, revidi = wiedersehen)

## 2: Nachsilben

- aĉ äussere Verschlechterung
- ad- Dauer, anhaltend
- aj- Sache, ein Etwas (trinkaĵo = Getränk)
- an- Einwohner, Anhänger (urbo=Stadt, urbano=Städter)
- ar- Sammelbegriff (ŝipo=Schiff, ŝiparo= Flotte)
- ĉj- männliche Koseform
- ebl- Möglichkeit (legebla=lesbar)
- ec- Eigenschaft (klara = klar, klareco = Klarheit)
- eg- Vergrößerung (pordego=Tor)
- et- Verkleinerung (strato=Straße, strateto=Gasse)
- ej- Raum (lernejo = Schule)
- em- Neigung, Hang (ŝparema = sparsam)
- end- Notwendigkeit (pagi=zahlen, pagenda= zu zahlen)
- er- Einzelteilchen (pano = Brot, panero = Krume)
- estr- Oberhaupt, Leiter (estro)
- id- Nachkomme, Junges
- ig- machen, veranlassen (sata= satt, satigi=sättigen)
- iĝ- werden (blinda, blindiĝi)
- il- Mittel, Werkzeug (ŝlosi = abschließen, ŝlosilo=Schlüssel)
- in- weibliches Geschlecht (patrino = Mutter)
- ind- wert, würdig (vidi = sehen, vidinda = sehenswert)
- ing- Halter (plumo = Feder, plumingo = Federhalter)
- ist- Beruf (maŝinisto)
- nj- weibliche Koseform
- obl- Vielfaches (duobla=doppelt)
- on- Bruchteil (triono = Drittel)
- op- Sammelzahl (ses = sechs, sesope = zu sechsen)
- uj- Behälter (cigarujo=Zigaretten-tasche, piro = Birne, piruso = Birnbaum)
- ul- Person (fremdulo = Fremder)
- um- verwandter Begriff (plena = voll, plenumi = erfüllen)
- io Land (Germanio)

## ĈU NEPROBLEMA AFERO?

*Tri viroj en doma kelo trovis 21 vinbarelojn - 7 plenajn, 7 duonplenajn kaj 7 malplenajn.*


*Kiamaniere oni dividu, ke ĉiu el la tri trovintoj ricevu la saman nombron da vino?*

## EN LA NATURO

Tri belaj floroj!  
Kiu ne konas la belan rozon?



Ĝi estas la reĝino inter la la floroj.  
La sunfloro estas la ora floro kun la nigra koro. Ĝi estas suneto.



La papilioj kaj la abeloj flugas de floro al floro.  
Kion ili faras tie? Ili suĉas mielon.



## Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:  
Libera Esperanto-Asocio en Germanio  
Freier Esperanto-Bund in Deutschland  
Renchener Str. 47. D-77704 Oberkirch  
Tel.: (0)7802 - 90 336  
Resp. /Verantw.: Albert Stephan (AFS)  
Kunlaborantoj / Mitarbeiter:  
Karl-Heinz Kersting, Essen (KHK)  
Hans Rodewig, Hannover (H.R.)  
Gary Mickle, Berlin (G.M.)  
Okaze / gelegentlich:  
Margot Stephan, Oberkirch  
Friedel Bues, Hannover  
F. W. Poppeck, Oberkirch  
Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj;  
la redakcio havas la rajton mallongigi aŭ  
rifuzi ensendojn.  
MAGAZINO aperas kvarfoje jare;  
abonprezo 15.- DM  
La membrakotizo entenas liveradon de  
la bulteno  
LEA/G-konto: Sonderkonto Kersting  
n-ro 416 210-432 Postbank Essen  
(BLZ 360 100 43)  
LEA/G tra SAT sur TTT:  
<http://www.worldnet.net/sat-esp/>

## Ĉu Esperanto estas politika afero?

Mi konscie formulis tiun demandon tre ĝenerale – oni povus ankaŭ diri «naive» – volante elprovoki kiel eble plej multe da kaj spontanaj kaj primeditaj reagoj de la alparolantoj. Kio estas la celo de la tuto? Tion klarigas la "alvoko" lokita sur ĉi tiu paĝo (vidu la keston). Mi jam komencis pridemandi berlinajn esperantistojn kaj ricevis (ankoraŭ mod-estant!) faskon de respondoj. Bonvolu legi ilin sur paĝo 14.


### INVITO

Memorindigo de la 20a jariĝo de la **Nacia Esperanto-Muzeo GRAY** la 26an/27an de aprilo 1997

#### Programo:

Sabate 15a horo: oficiala ceremonio  
17a horo: malkovro de tabulo NACIA ESPERANTO-MUZEO  
Dimanĉe ekde la 9a horo laŭplaĉe vizito: Nacia Esperanto-Muzeo, urbo Gray, Muzeo de artaĵoj, arkeologia kaj naturscienca galerioj, galerio pri religiaj objektoj, ktp.

Pri kostoj kaj tranokteblecoj informas:  
Fondinto kaj direktoro de la muzeo Geo Junier, Esperanto-Muzeo, 19 rue Victor Hugo, FR-70100 Gray.



Ĉu tiu agado sukcesos, mi ne scias. Sed mi certas, ke SAT ne povas permesi al si *ne* koni kaj analizi la pensojn de la esperantistaj "amasoj" pri tiu afero. Ĉu *vi* emas reagi? Adreso sube.

Ni formulas la demandon tiel simple (se vi volas, naive), eĉ je la risko provoki lakonajn respondojn de la tipo «ne, ĝi estas lingvo», aŭ «ĉio ja estas politika». Sufiĉas diri, ke ni ne estas la unuaj, kiuj vortumas la aferon tiel, kaj ke ni *celis* uzi larĝan, ne tre specifan formulon. Kial? Ĝuste por signali, ke ni ne celas tiri el la nazo de la alparolanto iun al la kunlaborantoj de la **Magazino** aŭ al SAT plaĉan respondon, sed vere ekscii, kion multaj esperantistoj kaj Esperanto-parolantoj pensas pri tio.

Eble vi jam divenis, ke ne temas pri sociologia enketo, kies rezultojn oni povus analizi per statistikaj metodoj. Ĝia celo estas heŭristika, alivorte (por tiuj kun aversio kontraŭ terminoj kiel «heŭristika»), konatiĝi kun multaj alternativaj, eble ne antaŭe rimarkitaj manieroj aliri la starigitan demandon. Gemute dirite, ĝi helpu al la samlingvanoj pli bone ekkoni unu la alian.

Ni ŝatus starigi nian demandon al multaj homoj kaj publikigi la respondojn en konstanta rubriko de la **Magazino**, kiu daŭru almenaŭ ĝis tempo, kiam neniŭ plu havos ion novan por diri pri ĝi. Neniŭ bezonas timi, ke la satanoj brulstamos lin aŭ ŝin pro eventuala «nelaŭlinia» respondo. Tute kontraŭe:

- Ni volas publikigi la alvenantajn respondojn sen nomindikoj – kvankam kun ĝeneralaj indikoj, ekzemple pri la aranĝo, ĉe kiu ni kolektis la respondon, aŭ pri ĝia porpoŝta al veno, aŭ ke ni lingve korektis aŭ tradukis ĝin. Respondojn en aliaj lingvoj ni nepre tradukos, sed ni lasos vian tekston nekorektita, se vi petos tion.
- Ni volas entute deteni nin de tuja komentario pri la respondoj. Tamen, post iom da tempo aŭ je la fino ni volos resumi niajn impresojn kaj invitoj legantojn de la **Magazino** fari same.

Nun ni bezonas la opiniesprimojn de multaj homoj. Ni arde deziras ankaŭ vian kunlaboron. Via respondo povas esti unufraza aŭ pli longa, kvankam ni petas verkemulojn sin limigi al maksimumo de ĉirkaŭ 300 vortoj. Vi povas subskribi per pseŭdonimo, se vi volas. Bonvolu sendi vian anonime publikigitan respondon al la **Magazino** per la adreso de: Gary Mickle, Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin (Germanio).

## La berlina Maldekstra Forumo: kio ni (ne) estas

### la grupo

Eble jam multaj legantoj de la *Magazino* jam renkontis la nomon de iu mistera berlina grupeto kun la nomo «Maldekstra Forumo» kaj scivolis pri ĝi kaj ĝia eventuala rilato al SAT kaj LEA/G. Estas tiel: ni estas grupeto, kiu membras samstatuse en la Esperanto-Ligo Berlino kiel aliaj grupoj kaj grupetoj, kiuj regule kunvenas. Ĉar tiaj grupoj en Berlino ne konstituigas formale, ne eblas indiki precizan membronombron. Okazis, ke al kunveno venis nur du kamaradoj, sed plej ofte venas kvar, foje eĉ ses aŭ sep partoprenantoj. Bedaŭrinde, ĉiuj regulaj partoprenantoj estas viraj (la seksa mal-ekvilibro estas almenaŭ rimarkita).

### estiĝo

La Maldekstra Forumo fondiĝis en oktobro de 1994 je iniciato de Will («Volo») Firth, kiu sondis la eblon fondi SAT-grupon en Berlino. La epiteto «maldekstra» verŝajne adekvate priskribas nin kaj niajn celgrupojn, sen implici ligan al iu specifa tendenco ene de la maldekstrularo. La nomon «forumo» proponis Hermann Tautorat, kiu poste tamen ne fariĝis regula grupano kaj post sia pasintjara morto nun dolore mankas al ni berlinaj esperantistoj. La nomo sugestas prave la celon integri kaj dialogigi heterogenajn homojn kaj tendencojn.

### celoj

Oni ne povus diri, kio estas la celoj de la Maldekstra Forumo, kaj neniu ĝis nun havis la ideon formuli ilin en ia statuto. Pozitive rimark-eblaj estas ĉefe du celoj: unue, informadi pri Esperanto en la maldekstrularo kaj ĝenerala publiko de Berlino kaj la ĉirkaŭaĵo per specife celgrup-konformaj rimedoj, due, interŝanĝi opiniojn kaj sciojn ene de la grupo. Kelkaj grupanoj pli-malpli memstare agadas publicistike, sed aprezas la opiniinterŝanĝadon, kiu eblas en la grupo. Ankaŭ pri SAT kaj LEA/G (aliloke nenia paroltemo en Berlino) oni povas interŝanĝi kelkfoje diverĝantajn opiniojn.

### agado

Ni kunvenas preskaŭ ĉiumonate. Sufiĉe regule (eble kvarfoje jare) kelkaj grupanoj faras inform-standon ĉe iu maldekstra manifestacio aŭ festo, partoprenas marŝmanifestacion kun sloganbendo, kiun ni faris antaŭ du jaroj. Ĉe tiaj aranĝoj ni kutimas disdoni flugfoliojn. (La temon *flugfolioj* mi trovas grava kaj intencas trakti ĝin detale en estonta numero de la *Magazino*.)

Will Firth prizorgas regulan Esperanto-kurson sur la paĝoj de *Direkte Aktion*, organo de la FAU

(Libera Laborista Unuiĝo), kaj en estiminda grado jam popularigis Esperanton en anarkisindikataj rondoj, ankaŭ per la bulteno *Ĝisdatigo*, kiu i.a. redonas kelkajn enhavojn de la *Direkte Aktion* kaj specife traktas la poresperantan agadon en FAU kaj ILA (Internacia Laborista Asocio). Pri tio bonvolu legi pli detale aliloke en ĉi tiu numero.

Ni produktis (t.e. unuavice la subskribinto, sed kun konsiderinda helpo de aliaj grupanoj) kvar informajn broŝurojn pri Esperanto, de kiuj ni vendas tre modestajn kvantojn je diversaj okazoj. Ili aperas en du serioj, unu ĝeneralinforma kaj la alia kun pli specife tema orientiĝo. (Ankaŭ la temon broŝuroj mi volus trakti pli detale en iu estonta numero.) Kiam mi komence eklaboris je tiuj broŝurserioj, mi esperis aperi kaj pli bonajn broŝurojn kaj ĉion fari en pli rapida takto, sed mi subtaksis la kunligitan laboron (kiel plej ofte okazas). Sed mi tamen volas nepre daŭrigi laboron je la du serioj, eĉ se la rapideco estus helika.

Volo kaj mi decidis estonte helpi ĉe la produktado de la *Magazino* (ĉe laboroj en la fotokopiejo kaj farante parton de la kompostado) kaj kontribui laŭ niaj fortoj (problemo estas por ni ambaŭ la disponebla tempo) ankaŭ en have al ĝi.

### statuso de la grupo

Eble la hibrida statuso de la Maldekstra Forumo konsternas, se oni rigardas la Esperanto-movadon kiel hierarkie strukturitan tutajon. Formale, ĝi estas – kiel dirite – konsista parto de la Esperanto-Ligo Berlino, la berlina filio de GEA. Aliflanke, ĝi estas objekte la sola ekzistanta renkontiĝejo de SAT kaj LEA/G-membroj en Berlino, da kiuj estas du en la grupo – en limigita grado ĝi do funkcias kvazaŭ filio de LEA/G. Oni devas diri, ke la statuto de ELB donas larĝan agadliberon al la apartaj grupoj, kiuj konsistigas ĝin. Ni agadas publike nur sub nia propra nomŝildo ("Maldekstra Forumo [Berlino]"). Verŝajne pro tio neniam estiĝis problemoj rilate la tielnomatan «neŭtralecon» kaj mi estas optimisma, ke tiel restos ankaŭ estonte.

### kio estonte?

Laŭ mi tro aŭdaca demando. Eble mi unue diru, kion ni tre verŝajne *ne* sukcesos fari: prezenti al SAT, LEA/G kaj la mondo koheran vizion pri kredinda maldekstra aŭ revolucia esperantismo fine de la 20a jarcento. Mi mencias tion, ĉar mi bedaŭras tiun malpovon – laŭ mia persona opinio SAT urĝe bezonas ĝuste tion.

Kion ni eble sukcesos fari? Mi esperas, ke ni helpos levi la kvaliton kaj larĝigi la enhavospektron de la publicistiko de SAT kaj LEA/G. Ni almenaŭ komencis labori sur tiu kampo.

Gary Mickle

## Renkontiĝo en la berlina metroo

Ĝis nun en mia vivo dufoje okazis, ke mi hazarde konatiĝis kun esperantistoj en publikaj trafikiloj – en kiuj mi aŭdis ilin interparoli en nia lingvo kaj alparolis ilin. Verŝajne mi havis bonan ŝancon. Multaj certe neniam havis tian travivaĵon.

La unuan fojon tio okazis al mi en 1974 aŭ 1975. Iam vespere en Kreuzberg mi eniris metroan trajnon kaj sidiĝis sur benko apud du gemaljunuloj (geedza paro, kiel montriĝis). Se mi ĝuste memoras, mi tuj direktis mian rigardon en iun kunportitan legaĵon, kiel kutime. Iom poste mi tamen ekperceptis, ke la du homoj apud mi parolas iel familieran lingvon, kiun mi post kelkdek sekundoj (ili nelaŭte parolis kaj mi devis atente aŭskulti) identigis kiel ĝuste Esperanton. Je tio mi ne povis ne reagi, do mi interrompis ilian interparolon, demandante (kia stulta demando), ĉu ili estas esperantistoj. Kompreneble ili ekmiris, eble des pli, ĉar junaj esperantistoj en Okcidenta Berlino estis tiutempe pli raraj ol nun.

Ni kunveturis nur kelkajn staciojn, sed la tempo sufiĉis, por ke ili diru al mi, ke ili veturas hejmen post sia Esperanta grupkunveno en Wedding (kie mi nun loĝas), ke temas pri SAT-

grupo (al kiu ili invitis min veni), kaj ke ne, ili neniam iras al la kunvenoj de la Esperanto-Ligo Berlino. El tiu lasta eldiro mi kredis rimarki (kvankam mi povas erari) certan malemon rilate al tiu organizaĵo, kiun mi interpretis kiel postrestaĵon de la historia teniĝo de SAT al la «neŭtrala» movado.

Poste, mi neniam trovis tempon viziti tiun grupon, pri kiu mi suspektis, ke ĝi ne plu estas tre granda aŭ agema. En postaj jaroj mi tre bedaŭris tion. Pri la motivoj kaj biografioj de tiu antaŭa SAT-generacio mi siatempe, kiam tio eblis, neglektis informiĝi senpere. Ŝajnas, ke ankaŭ la tiamaj SAT-anoj de la tiama Okcidenta Berlino maltrafis la (principe haveblan) okazon ekkoni la lokan esperantistan junularon de la fruaj sepdekaj jaroj, kiu, kvankam en «neŭtrala» grupo organizita kaj UEA-orientita, estis politike maldekstrema kaj tute ne plu neŭtralema laŭ la klasika komprenmaniero.

Kiu havis rilatojn kun la tiama SAT-grupo de (okcidenta) Berlino? Kiu povas liveri al ni informojn pri ĝi kaj ĝiaj membroj? Informojn dankeme ricevus: Gary Mickle, Brüsseler Str. 6, 13353 Berlin.

Gary Mickle



## Ĉu Esperanto estas politika afero? (daŭrigo de paĝo 11)

Jen la unuaj kvar ricevitaĵaj respondoj:

- Mi ne scias, ĉu ĝi estas, sed ĝi ne devus esti.
- Zamenhof diris: «*Esperanto estas ĉies kaj nenies propraĵo.*»

Sekve de tio ni havas la UEA, organizon, kiu parolas (volas paroli) en la nomo de ĉiuj E-istoj; SAT; la fervojistoj havas sian organizon, la Oomoto ankaŭ; la frenologojn mi trafis en Londono; kaj ni konas multajn aliajn grupojn kaj grupetojn. Ili ĉiuj uzas E-on por disvastigi siajn ideojn. E-o nur estas rimedo, ne la celo.

Zamenhof havis la «internan ideon» – li celis pere de E-o al mondpaco.

Do, ankaŭ por li E-o nur estis rimedo por atingi la celon: la PACON.

Por tion diri klare: ŝajnas al mi, ke nur UEA celas enkonduki E-on en la mondon – sed, tamen, ankaŭ ĝi nur povas atingi tiun celon pere de la politiko.

*Resumo:* Esperanto estas nur rimedo por atingi certan celon.

- Ĉu «politika afero difiniĝas per tio, kio okupas politikistojn? Eble; sed ilin ĉiam nur tiaj aferoj interesas, pri kiuj jam multaj aliaj eminentuloj parolas; kaj se la propra partio ankoraŭ ne fiksas sian oficialan opinionon, ili nur papagas bagatelaĵojn.

Ni pli bone lasu la politikistojn kaj diru: Politika afero estas iu temo, kiu troviĝas en publika diskuto. (Alia difino necesus en diktatureca ŝtato.) Ĉu Esperanto estas tia temo? Nuntempe certe ne, ĉar tro malmultaj homoj scias sufiĉe pri Esperanto por povi aŭ voli diskuti ĝin. Ni rigardu fikcian situacion post la ofte citita «fina venko»: La plej multaj homoj kun internaciaj rilatoj kompreneble uzas

Esperanton por tiu celo. Tiam ne (plu) necesas diskuto; jen ankaŭ neniu politika afero pri Esperanto.

Nur por atingi iun rimarkeblan paŝeton inter tiuj ekstremoj oni ja devas klopodi por ŝanĝi aferojn kontraŭ la opinioj kaj interesoj de aliaj, do diskuti, batali, ...politikumi. Kiu iras tiun vojon, povas aserti, ke Esperanto estas – por li – politika afero.

- En la hodiaŭ versajne plej vaste uzita senco de «politiko», kiel ĝenerala esprimo por agado, potenco-rilatanta, celanta organizadon de homa kunvivado: jes.

Kompreneble oni povas uzi esperanton ĉiucele, sencele eĉ, sed ĉiu ĝin uzas en mondo moviĝanta kaj kiel «reprezentanto» de difinitaj interesoj. Sen depende de la propra volo, la interesoj de aliaj estas tuŝataj. Per – pli malpli – evidenta reago aŭ – ŝajna – ignoro tiuj respondas. La konflikto de la diversaj alrigardoj politikigas – kiel ankaŭ ĉiujn aliajn ideojn kaj agadojn – esperanton. Eĉ se ne estas la deziro de esperantisto influi homan kunvivadon, li tamen ĝin influas: porbatalante, kontraŭstarante, neglektante.

Sekve: ne volo, ne ago ne liberigas de respondeco. Vole nevole ĉiuj homoj partoprenas en la plej granda – ne nepre sangoplena – «batalo», kies svaga celo estas plibonigo de la «mondo», t.e.: serĉado de feliĉo.

Esperanto estas multflanka respondo al aro da demandoj – interalie – politikaj. Ĉar mi preferas konscian influon (ol influon hazardan), mi pledas – bona ebleco ĉi tie – por voĉoj same precizaj kiel laŭtaj (akompanata de oreloj malfermitaj), t.e.: konkretigo de vastaj demandoj kiel la supra. Mi tion ĉefe diras al mi.

*Dankon al la respondintoj! (G.M.)*

## Spirita milito

En Usono prosperas la 'elektronika eklezio' de la evangeliistoj. Malgraŭ skandaloj de kelkaj el ili, pri kiuj ankaŭ skribis eŭropaj gazetoj, la religia telekomunikila industrio floras. Se iu vetuas tra Usono de Novjorko al San-Francisko, tiu povas aŭskulti dum la tuta tempo ekleziajn radiostaciojn.

### propagando de dekstruloj

La verkinto de la libro *Spirita Milito*, Sara Diamond, skribis, ke la religiaj programoj ne estas nur komenco, sed precipe propagando de la dekstruloj. Kompreneble, ĉio okazas 'laŭ instruo de la biblio'. La plejmulto de la religiaj programoj propagandas *malrekte* kaj kreas ideologian fonon kaj ĝeneralan mondkoncepton. Kiu ne kongruas kun ilia ŝablono, tiu meritas esti sen rajto.

La alia konstanta temo estas la supereco de Usono. Kiam iu lando havas alian vidpunkton ol la usona opinio, tiam ĝi estas 'komunisma'.

Ankaŭ la bulteno de la Kalifornia Ekumena Konsilantaro kritikis la agmanieron de la 'elektronikaj evangeliistoj'. Laŭ ĝi, ili intencas ne disvastigi religion, sed nur influi la politikon.

La evangeliistoj eĉ konkurencas la katolikajn movadojn de pastroj en Latinameriko kaj la disvastigon de la 'liberiga teologio'. Pli abomeninda estas la subteno al subpremantaj registaroj.

*Ĉu ni eŭropanoj heredos ankaŭ tian kulturon el Usono?*

*Henriko*